

Belartaj Konkursoj de UEA 1995: Dua premio

La du testamentoj de *Sándor Szathmári*

La unua

Estas malfacile kompreni verkiston, kies verkaro konsistas el originalaj verkoj en du malsamaj lingvoj. Por esplorado la teksto malfacilas eĉ pli, se temas pri du tiel raraj lingvoj kiel la hungara kaj Esperanto.

Sándor Szathmári estas unikaĵo en la monda literaturo. Kiel denaska hungaro kaj spirite denaska esperantisto li uzis en siaj romanoj, noveloj, studoj kaj dramaj tekstoj ambaŭ lingvojn. Legante liajn verkojn ni ofte «veas»: ho, se li estus estinta anglalingvano, oni menciis lin samtempe kun Aldous Huxley kaj George Orwell... Aŭ se li naskiĝus ruso, oni konus lin pli bone ol Jevgenij Zamjatin.

Ni, esperantistoj, tre bone konas la

valoron de lia *Vojaĝo al Kazohinio* kaj tiun de *Maŝinmondo* kaj de aliaj noveloj; ni estas dankemaj al la aŭtoro pro liaj favoraj vortoj pri Esperanto en la hungarlingva medio – eĉ se iam okazis malgranda «ofendiĝo» en Esperantujo pro la Budapeŝta ekzameno. En Hungario Szathmári neniam ironiis pri lia ŝatata Esperanto, ĉar ĉagrenis lin, ke la malgrandlingvanoj – kiel ankaŭ hungaroj – ne rekonas la benon de neŭtrala internacia lingvo.

Lia personeco estis tiom orientita en la direkto de l' internaciismo, ke liaj origine hungarlingvaj verkoj ŝajnas esti kvazaŭ origine Esperantaj.

Tia estas ankaŭ lia elstara romano, kiu kuŝis en tirkesto ne malpli ol 59 (!) jarojn. Temas pri la tria parto de la trilo-

gio *Vane* [Miába], kies titolo estas *La estonto*.

Ses jaroj (1985-1991) mi okupiĝis pri la malkovrado de la Szathmári-verkaro. Dum tiam mi povis konvinkiĝi, kiel aŭtenta estas la ofte citata latina proverbo, nome ke «ĉiuj libroj havas sian propran sorton [Habent fata sua libelli].

Szathmári (kiam mi persone ne konis), ofte menciis en siaj aŭtobiografio kaj intervjuoj, ke komence de la tridekaj jaroj li verkis trilogion pri la senesperaj homaj klopodoj plibonigi la homan sorton. Tion ĉi inspiron li ricevis de unu sia amiko, pentroartisto Péter Illésy, kiu foje diris al Szathmári: «Mi havas unu temon: supre, en la maldekstra angulo, sidas Budho en sia tipa pozo kaj meditas. En la dekstra angulo predikas Jesuo. Malsupre silentas la Sfinkso, duone kovrita per sablo. Meze estas la malkreska luno. Ĉu vi ne povus doni al tio trafan titolon?»

Szathmári respondis: «Vane».

Pli poste li rakontas: «Li (t.e. Illésy) ne pentris la imagitan bildon, sed la titolo ekvivis en mi kaj mi decidis priskribi tiun ĉi titolon kiel romanon... La libron mi verkis inter 1931-1932... Laŭ mia konvinko esenca manko estas en la homa naturo mem. Ĉiam leviĝis antaŭ mi pli kaj pli altan *La tragedia de l' homo* [far Imre Madách – mia rimarko E.T.], la rekono de la leĝo pri la eterna malfeliĉo... la homo en ĉiu tempo travivos la samon. El la sango de la profetoj ĉiam elkreskos nova tiranismo... kun la

samaj fenomenoj, tamen la homo ĉiokaze esperas, ke la eraro troviĝas nur en la slogano kaj ke la novaj doktrinoj kaj la nova slogano ĉion ĉi reĝustigos. La homo eĉ kredas, ke la ekzistanta socia sistemo estas esence alia ol la antaŭa, nur ĝi ne estas efektive aŭtenta, sed ke tia estos la sekva... Mi tre klare vidis la funkciadon de la malnova instinkto interbatigi, kiu ĉiam kaŭzas malkonkordon kaj subpremon kaj ke la homo mem elpensos ĉiam ion, ke li povu interbatigi» – diras Szathmári en sia aŭtobiografio.

Pri la trilogio li parolis «nebule», ŝajnigante, ke ĝi ne plu ekzistas, kvazaŭ li mem estus estinginta ĝin.

Dank' al Dio li ne faris tion. Li transdonis la verkon al sia bona amiko esperantista Kálmán Pandur (mortinta en februaro 1995). Kaj tia ĉi amiko konservis la manuskripton malgraŭ tio, ke ĝia kontraŭkomunisma tendenco povis kaŭzi al li seriozajn malagrablaĵojn – se ekzemple polico traekzamenus lian loĝejon. Feliĉe, la romano ne estis konfiskita kaj kiam Pandur eksciis, ke mi serĉas tiun ĉi delonge «perditan» verkon, li volonte transdonis ĝin al mi.

Kia surprizo trafis min! Mi povis legi majstroverkon de la aŭtoro, kiu jam delonge ne estas inter la vivantoj. Serioze dirite, mi ne supozis, ke iu povis verki simile elstaran «negativan» utopion kiel Orwell, kaj dek ses jarojn pli frue ol li mem.

Legante tiun ĉi trian volumon de

Vane – *La estonto* paĝo post paĝo mi konvinkigis pli kaj pli ke en miaj manoj troviĝas trezoro, kiu ne plu rajtas esti kaŝita antaŭ la publiko.

En 1988 Hungario jam vivis eŭforion de la proksimaj sociaj ŝanĝoj. Fondiĝis diversaj intelektulaj societoj, inter ili Hungara Protestanta Kultura Unuiĝo, kies kunfondinto mi estis. Miaj kolegoj tiam demandis min, pri kio mi ŝatus prelegi kadre de la Unuiĝo. Senhezite mi elektis la temon pri la retrovita sensacia romano de Szathmári. Ties kuriozan historion oni povis aŭdi aŭtune 1989. Mi laŭtleĝis kelkajn fragmentojn el *La estonto*, kiuj tiam pruviĝis profetaĵoj.

Post la prelego mi demandis, ĉu inter la ĉeestantoj troviĝas iu, kiu povus helpi eldoni la libron. Pozitive respondis ĉefredaktorino de *Beletra Eldonejo*, s-ino Aranka Ugrin. Ŝi faris tiun ĉi oferton: "Bonvolu liveri al mi la tutan verkon kaj se la tuto estas tiel bona, kiel la fragmentoj prezentitaj, tiam mia eldonejo estas preta aperi ĝin."

Mi apenaŭ kredis al miaj oreloj. La sekvan tagon la manuskripto jam troviĝis en ŝiaj manoj. Kaj baldaŭ sekvis tiu ĉi telefona mesaĝo: "Se vi sukcesos akiri la aŭtorajn rajtojn, tiam la romano povas aperi."

La vidvino de Szathmári konsentis kun la ideo kaj subskribis kontrakton kun la eldonejo. Post ĉirkaŭ unu kaj duonjaro finfine en 1991 la romano jam estis en librovendejoj. Dum kelkaj tagoj la stoko elĉerpiĝis kaj pri la verko aperis

tre favoraj recenzoj en diversaj literaturaj revuoj. Oni prave parolis pri la renesanco de Szathmári. Samtempe kreskis interesiĝo pri liaj aliaj verkoj kaj ankaŭ pri Esperanto. Iam forgesita aŭtoro regajnis renomon ne nur en literaturaj rondo, sed ankaŭ en la vasta publiko.

Kial? Ĉar lia majstroverko efikis ne nur per siaj beletraj valoroj, sed ĝi havis ankaŭ tre aktualan politikan enhavon. En meza kaj orienta Eŭropo ĝuste tiam fiaskis la komunismo kaj ĝia ideologia bazo, marksismo-leninismo, pruviĝis katastrofa filozofio, utopio, kiu kaŭzis nur suferojn al la homoj en tiuj landoj, kie oni aplikis ĝin en la praktiko. En la jaroj 1990-91 venkis la «delikata» revolucio, kiel oni ofte kaj volonte nomas tiun ĉi historian eventon.

Pri kio temas en «*Vane*» – *La estonto*? La romano roligas en la fiera estonto, 150 jarojn post kiam ĝi mem naskiĝis, do en 2082. Szathmári profetas, ke en la okdekaj jaroj de tiu ĉi (dudeka) jarcento (ni ne forgesu, ke li mortis en 1974) la revolucioj kaŭzos grandajn kaj avantaĝajn ŝanĝojn, sed post kelkaj jaroj ekregos totala komunisma diktaturo – ankaŭ en Hungario. Kálmán Hajós, la juna «kaplaboristo» (en la specifa enŝtata lingvonormo de Szathmári tio signifas «intelektulo») estas opoziciulo, sed tion li ne povas rekte esprimi en totale kontrolita ŝtato. Li volas profiti de unusola ebleco, kiun la potenco garantias: fondi aŭtarkian kolonion, kies celo, laŭ la soveta sistemo, estas en la kadro de

komunumo produkti kaj konsumi pli ekonomie kaj tiamaniere helpi la tiel nomatan «evoluo». Sed Hajós havas kaŝitan celon: li volas demokration en la kolonio, kies gvidanto li fariĝis. Paŝo post paŝo liaj klopodoj fiaskas. La homoj edukitaj en la diktaturo de soveta tipo tute ne komprenas lian intencan. La komunumanoj grupiĝas en diversaj marksismaj-leninismaj sektoj, kiuj interbatalas. Ekregas anarkio kaj Hajós, volenevole eĉ ne rimarkante ŝanĝojn en sia propra animo, fariĝas diktaturo.

Fine ne nur li estas murdita sekve de atenco, sed la atenculo mem eksplodigas la tutan kolonion, el kies loĝantoj neniu sukcesas pluvivi.

La verko de Szathmári estas la plej pesimisma negativa utopio. En tiu ĉi verko perdiĝas ĉiu espero. «Insulo» kiel kutima rifuĝejo de la utopiaj verkoj komplete pereas, neniiĝas. Sed ĉirkaŭ ĝiaj ruinoj ekzistas plu la totala diktaturo...

La strukturo de la romano iom similas al tiu de *Bestofarmo* de Orwell kaj priskribo de la atmosfero de la totaleco al alia verko de tiu ĉi aŭtoro, nome *1984*. Sed mi devas denove akcenti, ke Szathmári surpaperigis sian verkon 16 jarojn pli frue ol Orwell. Tiu ĉi interesa spirita koincido sugestas la penson, ke eble Szathmári, se li ne rezignus pri la ĝustatempa eldono de sia romano, estus hodiaŭ epitetita ne kiel «hungara Orwell» kaj eble Orwell estus nomita «angla Szathmári».

La dua

Mi jam menciis, ke la postmorta romano de Szathmári estis eldonita en historie tre grava periodo. Per sia *Vane – La estonto* la aŭtoro komunikis al ni, posteuloj, mesaĝon, kies esenco estas: Evitu la revenon de la diktaturo, kiu povas renaskiĝi kiam ajn, sub kiu ajn flago...

Krom la spirita testamento Szathmári liveris ankoraŭ unu testamenton, tute privatan, kies plenumiĝo devis atendi dekdu jarojn. Pri kio temas?

Foje en 1991, kiam mi vizitis sinjorinojn Szathmári, ŝi montris al mi paperon kun tiuj ĉi vortoj: «Jen la lasta deziro de mia edzo.»

Sur la folieto mi rimarkis deseguitan piramidaspektan objekton. Estis evidente, ke ĝi estis skizita per tremanta mano, sen linnilo. Post pli longa ekzameno mi konstatis, ke temas pri tetraedro, kies ĉiu edro havas unumetran lateron, laŭ la aldonita noto skribita per malgrandaj cifero kaj litero. Sur unu edro videblis tiuj ĉi vortoj: «Szathmári Sándor (1897-1974)».

Kortuŝite mi tenis tiun papereton kaj dume s-ino Szathmári triste rakontis, ke ŝia edzo sur mortolito testamentis, ke lian cindron oni deponu en tetraedroforma betona tombo, tamen ŝi ne povis plenumi tiun ĉi lastan deziron, ĉar la direktoraro de la Budapeŝtaj tombejoj ne konsentis kun tia «strangaĵo». Inter 1974-1990 ŝi multfoje ripetis sian peton,

eĉ protektita de la altprestiga scienculo kaj poeto, akademiano Deszö Keresztury (nun 91-jara), amiko de Szathmári. Sed vane – la burkrajtoj de la socialisma ŝtato ne cedis. Ĉu ne eblas entrepreni ion hodiaŭ, kiam la komunismo jam agonias? La demando de la vidvino sonis al mi kiel morala alvoko.

Kial entute Szathmári deziris tiel kuriozan tomboŝtonon? La vidvino tion ne sciis. Nur tion, ke ŝi ne deziris morti sen plenumi la lastan deziron de sia edzo. Ŝi deziris vidi ties realigon.

Mi demandadis amikojn de Szathmári pri la kialo de tiu ĉi testamento. Baldaŭ mi eksciis, ke la verkisto jam delonge antaŭ sia malsaniĝo ofte pensis pri la morto kaj al la plej proksimaj li diris, ke la homo eĉ en sia polva ŝtato servas kiel konstrumaterialo de la mondo. Krome, laŭ li la tetraedro estas la plej perfekta geometria korpo en la spaco. Ĝi esprimas la esencon de stabileco en la plej konciza formo, pli simple kaj pli precize ol la kvinedra piramido. Jen la simbola mesaĝo de la verkisto kaj – inĝeniero!

Ĉu ekzistas tia homo, kiu komprenos tion kaj helpos tiurilate? Longe mi meditis pri tio kaj preĝis en firma kredo, ke Dio ne hazarde direktis min por trovi la «perditan» manuskripton de *Vane – La estonto*. Li certe inspiris min al plia paŝo. Kaj tiel okazis.

Foje interna sento sugestis al mi turniĝi al la ŝtatprezidanto Árpád Göncz. Tamen ŝajnis al mi absurde, kial la nova prezidanto de Hungario okupiĝu

pri tia «bagatelajo». Mi polemikis kun mi mem: ja, ne povas temi pri ia bagatelajo! Temas pri testamento de unu lia kolego. Ĉar ankaŭ Árpád Göncz estas verkisto, kiu multe suferis dum komunismo. Jes, li estas la homo, kiu komprenos kaj helpos! Sed – mi daŭrigis mian meditadojn – mi ne konas lin. Oni devas serĉi konvenan okazon por povi renkonti tiun homon, cetere tre okupitan.

Tiu ĉi sopirata okazo baldaŭ venis. Mi estis invitita al kunsido aranĝita de Fonduso Friedrich Neumann por mezeŭropaj intelektuloj diversnaciaj kun la celo diskuti pri iliaj komunaj aferoj. «La kunsidon prezidos s-ro Árpád Göncz, ŝtatprezidanto de Hungario» – mi legis en la invitilo.

«Jen la ŝanco, nun aŭ neniam» – kaj post la kunsido mi turnis min al li. Okazis tio, kion mi apenaŭ kuraĝis kredi. Sinjoro Göncz kun granda interesiĝo aŭskultis la historion pri la testamento de Szathmári. Jes, li legis *Kazohinio* kaj komprenas la esencon de la lasta deziro de lia kolego. Li promesis helpon kaj instigis min ĉion ĉi skribi al li per letere, ke li eĉ hazarde ne forgesu kaj ke la afero estu dokumentita. Li adiaŭis min per amikaj, senperaj vortoj, ĝojante, ke li povas helpi.

Al mia letero mi aldonis unu ekzempleron de *Vane – La estonto*. Baldaŭ mi ricevis la respondon kun la informoj kiel komenci aranĝi la aferon. Kaj piednote la respondinto per jenaj vortoj dankis la librodonacon: «Vi kaŭzis al mi grandan

ĝojon por ĝi – ĝuste nun mi legis favoran recenzon pri ĝi.”

Ne estas loko por detale priskribi miajn taskojn, kiujn mi devis plenumi ĝis la tago, kiam finfine plenumiĝis la testamento de Sándor Szathmári. La 5an de majo 1992 okazis honoriga akto en la tombejo «Farkašréti», kie sur la 32a parcelo estis starigita tetraedro. Okaze de tiu ĉi evento kunvenis multaj estimantoj de la forpasingo, plejparte esperantistaj. Unue eksonis dia mesaĝo far kalvinisma pastro. Poste, en la nomo de la hungaraj verkistoj, parolis Anna Jokai,

elstara verkistino kaj la tiama prezidanto de la Hungara Verkista Asocio. Fine vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio Árpád Máté menciis la meritojn de Szathmári kiel Esperanta verkisto. Ĉiuj hungaraj ĵurnaloj rememoris pri tiu ĉi solenaĵo.

Forpasis tri jaroj. Ofte mi pensas pri la fakto, ke la efektiviĝo de tiu ĉi dua testamento substrekas la mesaĝon de la unua. Ni, kiuj vivas en tiu ĉi parto de la terĝlobo, devas tre serioze konsideri la atentigon de la elstara verkisto.



Premio ONISABURO DEGUĈI

Por sia tuta verkaro kaj multflanka agado,
nia elstara unua redaktoro kaj kunlaboranto, poeto kaj tradukisto

William Auld

ĉi-jare ricevis la premion **Onisaburo Deguĉi**.

Volonte kaj tutkore ni gratulas lin pro tio.

En la kongresejo Simo Milojević voĉlegis la dankvortojn de la premiito,
kiujn eblas legi en la oktobra n-ro 1995 de *Esperanto* de UEA.

Ties legadon ni varme rekomendas.